
# DIA REGNO

✪ dumonata kristana revuo en esperanto ✪ n-ro 1 (856) ✪ 2006

DIA REGNO

ISSN 0167-9554



**KELI**

**Kristana Esperantista Ligo Internacia**
**fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA**

**Celo:** *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

**Prezidanto**: Philippe COUSSON
✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
✆ +33 (0) 549468021;
💻 keli@chez.com

**Sekretario**: Els VAN DIJK-KUPERUS
✉ Koningsmantel 4,
NL 2403 HZ Alphen a/d Rijn, Nederlando;
✆ +31 1724 20222;
💻 e.a.vandijk@hetnet.nl

**Kasisto**: Siegfried KRÜGER
✉ Dinkelsbühler Str. 12,
DE 74074 Heilbronn, Germanio;
✆ +49 7131 162688;
💻 SLKrueger@gmx.de

**Kotizoj:** Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- ✪ Membro-subtenanto €30,- ✪ Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- ✪ pagante al Libroservo €18,- ✪ Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. ✪ Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI ✪ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI: 5506132.

Vizitu ankaŭ la ttt-paĝon **www.chez.com/keli/**

---------------

DIA REGNO

**Oficiala organo de KELI, fondita en 1908**
**dumonata revuo - ISSN 0167-9554**

**Redaktoro**: Bengt Olof ÅRADSSON
✉ Heimdalsvägen 24,
S 149 32 Nynäshamn, Svedio;
✆ +46 (8) 52016816;
💻 dr_boarad@yahoo.se

**Kontrollegis**: Éva FARKAS -TATÁR

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

***Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.***

**Ekspedado:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10
✉ CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio;
✆ +420 325 615 651;
💻 Cea.polnicky@quick.cz

**Presado:** Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
💻 info@astroprint.cz

## ENHAVO

| | |
|---|---|
| Novjaro 2006 | 3 |
| La ideo de numinoso ĉe Rudolf OTTO | 4 |
| Prezentado pri la epistolo al la Galatoj - dua parto | 6 |
| Pri la temploj de Niĵnij Tagil | 11 |
| Oni apenaŭ povas kredi ... | 14 |
| Mi estas kiu estas - parto 7 | 15 |
| Konfeso | 17 |
| Garantiata sato | 18 |
| La profilo - Britta Rehm | 19 |
| Libro: La frakseno Igdrasilo | 20 |
| Libro: Pano por Animo | 21 |
| Informetoj | 22 |
| KELI-kongreso - listo da partoprenantoj kaj temo | 23 |
| Preĝo de Manase | 24 |

## REDAKTORAJ VORTOJ

Ni vidas sur la fronta paĝo niajn du vivfundamentojn, la spiritan kaj la fizikan/biologian kadrojn. Mi ŝatus inviti vin pritrakti tiujn temojn en artikoletoj aŭ pensoj kiel preparo por nia somera KELI-kongreso, kies proponita temo estas *Naturo kaj progreso: kion toleri?* Ni ofte legas kaj aŭdas pri la minacoj kontraŭ nia tero, la naturo kaj nia societo. En januaro mi partoprenis kunvenon kaj dum tri horoj mi aŭskultis homojn kiuj plendis pri la nuna situacio. Mankis al mi kion ni, kiel individuoj, povas fari kaj agi. Laŭ mi nia kredo ne permesas nin nur pasive rigardi la evoluon. Kontraŭe ni devas (mal)grande kaj respondece agi laŭ niaj fortoj, kapabloj aŭ talentoj. Eble nur simple temas pri pli zorge elekti nian aĉetaĵojn. – Kion vi pensas? Rakontu!

# Novjaro 2006

Philippe COUSSON, FR
Prezidanto de KELI

Karaj gefratoj, kiam mi verkas ĉi tiun tekston, la jaro nova jam komenciĝis.

Multaj inter ni sin demandas, ĉu la kristana esperantista movado pluvivos? Estas vere, ke kiam oni rigardas la nombron de membroj de KELI en niaj kongresoj, kiam oni rigardas la fand-iĝintan liston de la abonantoj al nia revuo Dia Regno, oni povas havi dubojn.

Tamen, mi volas lasi al vi tiun defion: antaŭenigi KELIn.

Kiuj estas la celoj de nia Ligo, oficiale kaj resume el la statutoj? Kune vivi kaj celebri en Esperanto, propa-gandi por Esperanto inter kristanoj, kaj anonci la Evangelion al la Esperant-istoj. La kongresoj estas efektive grandaj momentoj de komuneco inter gefratoj en Kristo. Nia revuo estas bona ligilo inter ni, kun tre diversaj kon-tribuoj, kiujn oni ne trovus en nacia kristana gazeto.

Sed, laŭ mi, tio efektive ne sufiĉas por pluvivigi kristanan esperantismon. Ni bezonas celojn. Ni bezonas planojn.

El inter la jam cititaj celoj, efektive nur la unua estas plenumita, dum la kongreso kaj en kelkaj lokoj, kaj per la Biblio kaj la libro Adoru.

Ĉu ni daŭre misias inter esperant-istoj? Ĉu ni devas tion fari? Mi pensas ke jes. Sed kiel? Kun kiu?

Ĉu ni varbas por Esperanto en kristanaj rondoj? Certe, de tempo al tempo. Sed ĉu pli metode?

Rilate al tiu lasta punkto, mi volas aldoni, ke ni havas la devon demonstri ke Esperanto kapablas por kristana celebro (tio estas jam farita per Adoru post Adoru Kantante), kaj por teologia diskuto. Jam estis kelkaj provoj (Biblia Revuo, Evangeliaj Kajeroj, Biblia vortaro, Voĉoj kristanaj). Ni devas pripensi kiel antaŭeniri en tiun direk-ton, ĉu denove per revuo, ĉu per eldonado de libroj, ĉu per kolokvoj kaj konferencoj.

Prepari pluajn jarojn por KELI, tio estos nia defio en 2006.

Cetere, ni bezonas kelkajn personojn por la funkciado de la Ligo. Kelkaj funkciuloj deziras post multaj jaroj de deĵoro lasi la respondecojn. Kiu sentos sin vokita? Turnu vin al mi!

La graco kaj la paco de la Sinjoro estu kun vi ĉiuj dum ĉi tiu nova jaro.

Philippe
COUSSON



# La ideo de numinoso ĉe Rudolf OTTO

SOMHEGYI Zoltán

Rudolf OTTO estas multe pli malmulte konata ol la aliaj teologoj, Karl BARTH kaj Friedrich SCHLEIERMACHER, pri kiuj mi frue skribis. Tamen, ankaŭ li estas ege grava, kaj ne nur kiel protestanta teologo, sed kiel unu el la fondintoj de la moderna religia scienco.

Rudolf OTTO naskiĝis en Peine, apud Hannover en Germanio en 1869. Lia vivo estis plena de studoj kaj vojaĝoj. Li ege interesiĝis pri la okcidenta kaj la orienta kulturoj, do migris tra la tuta mondo, kelkfoje kune kun la fama religio-historiisto Helmut von GLASENAPP. Sed, apud tiuj vojaĝoj li havis universitatan karieron: li instruis en Göttingen, en Breslaŭ kaj fine en Marburg. Li mortis en 1937.




Se oni rigardas lian sciencan verkadon, oni povas diri ke lia plej fama kaj plej multe diskutita libro estis „La sankto” (Das Heilige), kiu aperis en 1917.

En tiu libro li serĉas la veran esencon de la religio. Unue, OTTO distingas du partojn, aŭ du eblecojn kiel oni povas paroli pri Dio: laŭ tio ekzistas racionalaj kaj irracionalaj parolmanieroj, aŭ ideoj kiujn ni kreas por esprimi niajn sentojn pri Dio.

Ĉi tie lia libro fariĝas interesa, ĉar laŭ Otto, nia esprimo „sankto” estas, aŭ fariĝis tro racia, kaj signifas ion similan al morala kaj etika. Por tio, li kreas novan esprimon: „numinosus”. La radiko de tiu vorto estas „numen”, kiu en la latino signifas dian forton, aŭ majeston. Tiamaniere, numinoso estas la majesto de Dio, lia irracionala, neesprimebla grandeco, kiu esprimo aŭ ideo nun ne plu havas racionalajn signifojn, ekzemple moralon. Estas la pura, nekomprenebla kaj neperceptebla esenco de Dio. Sed, kiel tiu esenco estas irracionala, ni ne povas klarigi ĝin, nur rigardi la efikojn kiujn ĝi estigas.


Granda parto de la libro estas la klarigo de tiu ideo. OTTO alvicigas diversajn elementojn de la numinoso. La unua nomiĝas „sento de la kreitaĵo”. Tiu estas la sento de la homo, kiu komprenas sian malgrandecon kontraŭ (aŭ apud) sia Kreinto. Oni trovas kelkajn ekzemplojn pri tiu sento en la Biblio, ekzemple kiam Abraham provas savi Sodom, kaj parolas al Dio, dirante: *„Jen mi ekkuraĝis paroli al mia Sinjoro, kvankam mi estas polvo kaj cindro.”* (Gen. 18:27).

Alia komponento de la numinoso estas la „mysterium tremendum”, do la sento de la tremiga mistero. Kvankam

ĝi estas tremiga, sed, se oni vere havas la senton de la kreitaĵo, tiu timo fariĝas respekto. Respekto antaŭ la majesto de Dio.

La aliaj komponentoj de la numinoso ankaŭ estas gravaj, sed pli facile kompreneblaj: la „energio de la numinoso" (orge). Tiu energio aktivigas la spiriton de la kredanto, por helpi lin vivi la kristanan vivon. La „fascinans", estas tiu, kiu altiras nin, kiel kontraŭpunkto de la „mysterium tremendum". Tiu kontrasto ekzistas paralele, ni trasentas nian malgrandecon, ni timas, ni havas respekton kaj ni proksimiĝas al Dio.

La dua parto de tiu ĉi libro de OTTO estas prefere historia ol filozofia teksto. Li skribas sian teorion pri la evoluo de la religio surbaze de la kategorioj de la numinoso. Tiu dua parto estis eĉ pli



Rudolfo OTTO

diskutata fare de la sekvontaj scienculoj.

Povas esti, ke tiuj ideoj ŝajnas esti tro strangaj por la kredantoj. Eble oni ne sentas la bezonon tiel distingi la elementojn en nia kredo. Tamen, mi pensas ke tiu scienca alproksimiĝo al la religio povas multe instrui al ni, kaj eble pliprofundigi nian spiritan vivon.

## La Regno de Dio

13 Tial ni ne plu juĝu unu alian; sed prefere ni juĝu, ke neniu metu en la vojo de sia frato faligilon aŭ ian ofendilon. 14 Mi scias, kaj konvinkiĝis en la Sinjoro Jesuo, ke nenio estas malpura per si; sed por tiu, kiu opinias ion malpura, ĝi estas malpura. 15 Ĉar se pro manĝajo via frato ĉagreniĝas, vi jam ne iradas en amo. Ne pereiĝu per via manĝaĵo tiun, por kiu Kristo mortis. 16 Via bono do ne estu kalumniita; 17 ĉar la regno de Dio estas ne manĝado kaj trinkado, sed justeco kaj paco kaj ĝojo en la Sankta Spirito. 18 Ĉar tiu, kiu en tio servas Kriston, plaĉas al Dio, kaj estas aprobata de homoj.

Romanoj 14

# Prezentado pri la epistolo al la Galatoj

Prelego en Piliscsaba, 18/07/2005 – dua parto

Philippe COUSSON, FR

Ho malsaĝaj Galatoj, kiu vin ensorĉis? vin, antaŭ kies okuloj Kristo Jesuo estis publike prezentita krucumita. 2 Nur la jenon mi deziras sciiĝi de vi: Ĉu per faroj de la leĝo vi ricevis la Spiriton, aŭ per la aŭdado de fido? 3 Ĉu vi tiel malsaĝaj estas? komencinte en Spirito, ĉu vi en karno nun perfektiĝas? 4 Ĉu vi vane tiom suferis? se ja tio estas vana. 5 Ĉu do Tiu, kiu donas al vi la Spiriton kaj faras ĉe vi miraklojn, tion faras per faroj de la leĝo, aŭ per la aŭdado de fido? 6 Tiel same, kiel Abraham kredis al Dio, kaj tio estis kalkulita al li kiel virto. 7 Sciu do, ke tiuj, kiuj rilatas al fido, estas filoj de Abraham. 8 Antaŭvidante do, ke per fido Dio pravigos la nacianojn, la Skribo antaŭpredikis la evangelion al Abraham, dirante: Beniĝos per vi ĉiuj gentoj. 9 Tial do tiuj, kiuj rilatas al fido, beniĝas kun la fidela Abraham.

Gal 3:1-9

## Galatoj 3:1-29

La tria ĉapitro komenciĝas per vortoj fortaj. Ĉu vi povas supozi ke ili ne validas ankaŭ al ni: Stultaj esperantistoj. Ĉu vi nenion komprenis?

Kun tia forto, li alparolas la Galatojn. Tiun apostrofon, li adresas al tiuj eklezioj, kiujn li fondis, kaj kies vivo ne ĉiam estis facila. En la 4-a versiklo li mencias la suferojn pro ilia nova fido.

Kial do tia admono flanke de Paŭlo? Same estas de la komenco de la epistolo. La kristanoj el Galatujo aspektas kiel kristanoj kiuj ne ĉion bone komprenis, aŭ kiuj estis trompitaj de iuj, kaj delogitaj for de tio, kion predikis Paŭlo, kaj kio permesis al la Spirito loĝi en ili. Ili alvenis al la ideo, ke por eniri la justicon de Dio, ili bezonis submetiĝi al la leĝo de Moseo.

En tiu ĉapitro, Paŭlo utiligas la temon de la heredaĵo de Abraham por malmunti ĉi tiun pretendon akiri la heredaĵon.

Ĉar fakte, okazas tiel, ke la heredanto pensas ke por ekposedi la familian domon, li bezonas aĉeti ĝin. Kiam oni provas sekvi la penson de Paŭlo, temas pri heredaĵo, heredanto, promeso. Li paralele kondukas du nociojn, kiuj kompletiĝas: la promeson de la beno de Abraham kaj la pravigon.

Unue, la pravigo. Pri kio temas?

Tute ne temas, kiel povus indiki la

nunan lingvouzon, pri maniero pravigi sin mem. Ne temas pri provo pravigi siajn agadojn, trovi por ili motivon pravan, klarigi kaj defendi ilin. Same, ne temas pri eniro en naŭza marĉandado kiu provus ekvilibri "nepravigeblajn" agadojn per aliaj "meritoplenaj" agadoj. Estas ĝuste la malo. La unua etapo de la pravigo, estas agnoski la nepravigeblon de niaj agadoj, tiel nepravigeblaj, ke nenio kapablas kompensi ilin. Ne bezoniĝas multaj, sed kiel sugestas la versiklo 10, unu sola mispaŝo pri la leĝo, kaj nenio plu valoras. Jen tiam malbeno, kaj neniu plu ebla pravigo. Do, la unua etapo estas agnoski nian kompletan nekapablon plenumi la tutan leĝon de Moseo aŭ alia.

Tiam, la pravigo estas scii, akcepti, ke malgraŭ tio, spite tion, Dio rigardas nin kiel justaj, pravaj, ĉar ni kredas en lia Filo Jesuo Kristo. Nenio speciala, nenio malfacila por fari. Dio rigardas kiel justa, prava, tiun, kiu kredas en Jesuo Kristo, krucumita kaj releviĝinta.

## La promeso al Abraham

16 Sed al Abraham kaj al lia semo la promesoj estis parolitaj. Li ne diras: Kaj al semoj, kvazaŭ pri multaj; sed kvazaŭ unu: Kaj al via semo, kiu estas Kristo.

Due, la promeso al Abraham, certe estas multe pli frua ol la leĝo de Moseo.

Krome, tiu ĉi promeso de beno ne koncernas nur la fizikan idaron de la patriarko, sed ankaŭ ĉiujn naciojn. La promeso de la beno de Abraham ne estis rezervita al unu popolo, sed al la tuta loĝata tero, al ĉiuj homoj. Ĝi estas alvoko al ĉiuj homoj.

Paŭlo pluiras en la argumentado, plu uzante la bildon de la heredaĵo, de la idaro. Fakte, por li, la idaro de Abraham estas... Jesuo Kristo. Kaj sekve ĉiuj, kiuj kredas en li.

La promeso de beno de Dio, farita unue al Abraham, renovigita al la Hebreoj kaj al Izraela popolo en la bibliaj tempoj, estas nun aplikata de Paŭlo al la tuto de la kredantoj en Jesuo Kristo. Ĉi tiuj estas la idaro de Abraham, kiu ajn estas ilia origino.

Kiam Paŭlo parolas pri la leĝo, li unue parolas pri la "faroj de la leĝo". Li volas denunci ilin. Li uzas pri ili bildon, kiun oni pli volonte uzos rilate al peko. Li parolas pri la karno. Efektive en nia tradicia religia kulturo, ni kunmetas la karnon kun la peko. La karno estas malforta. Eble en via lingvo, oni parolas pri la "peko de karno". Sed tie, li kunigas la karnon kun la faroj de la leĝo. Kiu logiko? Ĉar, fidi al la faroj de la leĝo, estas fidi al la karno. Plenumi la farojn de la leĝo, estas plenumi ilin ĉi tie sur la tero. Tio estas konfidi sin en la homo. Eĉ pli, ĉi tio en nia epoko estas relative pozitiva ideo. Sed por Paŭlo, kio gravas estas la Spirito. Ne la spirito de la homo, sed la spirito de Dio, la agado de la Spirito. Nu, karno estas antaŭvidebla malsukceso. Estas neebla plenumo.

Paŭlo eĉ pluiras. La faroj de la leĝo kondukas al la malbeno, ĝuste kontraŭe ol la promeso de la beno. Oni pensas, ke oni paŝas al la promeso, kaj oni mal-

proksimiĝas. Ĉar Paŭlo scias, li estis fariseo, ke estas neeble plenumi la tutan leĝon, efektivigi ĝin komplete. Tiu ĉi malbeno estas ligita al la homa naturo erarema. Por eliri el tiu malbeno, iu devis preni ĝin sur sin anstataŭ tiuj, kiuj ne kapablis. Jesuo estis pendigita sur la ligno.

Tamen, Paŭlo ankoraŭ ne finis pri la leĝo. Ĉar tiu leĝo ne kapablas konduki al la beno, al la promeso, ĝi kapablas montri sian propran nekapablon. Sed, tamen, ĝi montras la postulojn de la justico. En tio, ĝi funkcias kiel gvidilo. Tiel, montrante la vojon, montrante la neeblan kompletan iradon, ĝi montras la veran elirejon, kiu estas la fido al Kristo, la sola kiu iam ajn plenumis la leĝon.

Jen, la fido. Kiel la Galatoj alvenis al la fido? Kiel ili ricevis la Spiriton? Per la prediko.

Ne estis agadoj, ne estis faroj, ne estis savigaj faroj. Nur vortoj, nur vortoj aŭskultataj. Paŭlo predikis, kaj la Galatoj kredis. Kaj ili ricevis la benon promesitan al Abraham, ili ricevis la Spiriton. Tio estas donaco de Dio, tio estas la enhavo de la promeso. Tio ne estas la enhavo de marĉandado. Nenio por interŝanĝi kontraŭ la savo, kontraŭ la beno de Dio. La justulo vivos per la fido.

Kiu ajn li estas, la kredanto estas heredanto de la promeso. Li apartenas al Kristo. Li estas unu kun Kristo, kaj kun la aliaj kredantoj, kiuj ajn ili estas.

Ne plu estas, nek Judo, nek Greko, nek sklavo, nek liberulo, nek viro, nek virino. Tiuepoke, kaj nunepoke, tiu ĉi parolo estas forta kaj liberiga, kiam ĝi estas komprenita kaj vivita. Ĉar la promeso de Dio ne distingas personojn. Ĉiuj kredantoj en Jesuo Kristo estas filoj de Dio, kaj kunheredantoj. Ĉiuj.

## Galatoj 4:1-31

En la sekvanta ĉapitro, la kvara, Paŭlo daŭrigas kun tiu temo, parolante pri infanoj kaj sklavoj.

*1 Kaj mi sciigas vin, ke tiel longe, kiel la heredanto estas infano, li neniel malsimilas sklavon, kvankam li estas estro de ĉio; 2 sed li estas sub guvernantoj kaj administrantoj, ĝis la templimo difinita de la patro. 3 Tiel ankaŭ ni, dum ni estis infanoj, estis en sklaveco sub la elementoj de la mondo; 4 sed kiam venis la pleneco de la tempo, Dio elsendis Sian Filon, el virino naskitan, sub leĝo naskitan, 5 por reaĉeti tiujn, kiuj estas sub la leĝo, por ke ni ricevu la filadopton. 6 Kaj ĉar vi estas filoj, Dio elsendis la Spiriton de Sia Filo en niajn korojn, kriantan, Aba, Patro! 7 Tiel ke ĉiu el vi estas jam ne sklavo, sed filo; kaj se filo, ankaŭ heredanto per Dio. 8 Tamen, tiam ne konante Dion, vi estis en sklaveco al tiuj, kiuj nature ne estas dioj; 9 sed jam nun konante Dion, aŭ pli ĝuste, de Dio konate, kial vi returniĝas al la malfortaj kaj mizeraj elementoj, al kiuj vi deziras denove sklaviĝi? 10 Vi observas tagojn kaj monatojn kaj tempojn kaj jarojn. 11 Mi timas pri vi, ke eble mi vane laboris ĉe vi.*

Gal 4:1-11

## La 4a ĉapitro

V. 1-11 : infanoj kaj sklavoj

- V. 12-16 : Paŭlo kaj la Galatoj
  - V. 17-18 : Fervoro
- V. 19-20 : Paŭlo kaj la Galatoj

V. 21-31 : infanoj kaj sklavoj

Oni povas analizi tiun ĉi ĉapitron en pluraj enŝovitaj partoj. Inter du partoj parolantaj pri infanoj kaj sklavoj, du aliaj partoj kiuj pritraktas la personajn rilatojn inter Paŭlo kaj tiuj eklezioj, kaj tiuj ĉirkaŭas pecon pri fervoro kaj fervoraj personoj.

En la teksto troviĝas pluraj malsamaj vortoj por indiki la infanojn. Troveblas ankaŭ la vorto "filo". La signifoj estas, ĉu heredanto, ĉu neplenaĝa aŭ bebo.

La infano de la unua parto estas tiu, kiu, kvankam heredonto, restas infano, do dependa, kaj do havas statuson similan al tiu de sklavo, sen aŭtonomio. Li devas submetiĝi al kuratoroj, al edukistoj, al pedagogoj. Kelkaj komentistoj identigis tie la antikvan juran situacion de la neplenaĝaj orfaj heredantoj. Ili devas atendi certan aĝon antaŭ ol plene heredi.

En tiuj ĉi partoj, oni trovas la vortojn sklavo, sklaveco, sklavino. Tiuepoke, neniu socia rajto estas por la sklavoj. Sklavo devas obei, devas submetiĝi en ĉio. Li ne estas libera en siaj movoj, en siaj agoj, eĉ en sia vivo mem. Krome, la sklaveco, al kiu aludas Paŭlo en la komenco de la parto estas ligita kun io mistera, la elementoj, la elementoj de la mondo, la fortaj kaj mizeraj elementoj, aŭ dioj, kiuj nature ne estas dioj. Ekzistas tiom da aferoj, personigitaj aŭ ne, kiuj kapablas sklavigi nin, mastri niajn pensojn kaj agojn. Ne utilas reiri al la antikva tempo por kompreni tion.

Por eliri el tio, Paŭlo rediras al siaj legantoj tion, kion Dio volis kiam li sendis sian Filon: li volis tiri la homojn el la sklaveco, por partopreni en la heredaĵo, por doni al ili la heredantecon. Por klarigi tion, Paŭlo uzas la juran kadron de la adopto, bone konatan tiuepoke. La adoptado estas ricevita de Dio per Kristo, per la Filo. Kaj al siaj adoptitoj Li sendis sian Spiriton, sian blovon en niajn korojn. Tiu ĉi adoptado signifas la finon de la servuteco, de la sklaveco, la juran finon de la antaŭa vivo, novan nomon kaj la statuson de heredanto.

Kaj en la fina parto de la ĉapitro estas asociitaj la statuso de heredanto kaj la promeso. La promeso montras la heredanton. La heredanto evidentigas la promeson. La vera heredanto estas la filo de la promeso, estas Isaak. Li estis la filo de la libera virino. La promeso permesas la liberecon. Sen promeso, sen espero, neniu libereco. Sen malfermita horizonto, neniu libereco, nur daŭra sklaveco. Kontraŭe, jen la filo de la karno, la estonto konstruita per elturniĝoj, provante plenumi la promeson per si mem, perfortante la manon de Dio. Tiu filo de la sklavino ne estas tiu de la promeso, li estas tiu de la persona sukceso, se vere estas sukceso. Ĝi estas memfarita.

Tiel Paŭlo volas rememorigi la Galatojn, ke la heredaĵo ne haveblas per submetiĝo, nek per klopodoj, nek per sklaviĝo, nek per kapablo, sed per la alproprigo de la promeso, per la akcepto de la adopto. La heredaĵo, la libereco, la savo estas donitaj de Dio, kaj ne estas obteneblaj per obeo.

En tiu ĝenerala kadro, Paŭlo elvokas al la disĉiploj la epokon kiam li venis. Tiam li estis malsana, aŭ handikapita, eble de la okuloj laŭ sugesto de la 15a versiklo. Kaj estas facile kompreneble ke tiu handikapo povis aspekti forpuŝiga laŭ versiklo 14. Tiun malsanon oni ne povas pli bone koni. Neniu alia indiko estas donita, kaj tio fakte ne gravas. Kio gravas estas ke malgraŭ tio, la Galatoj ne deturniĝis de la mesaĝo de la Evangelio, de la parolado de Paŭlo. Tiu mesaĝo estis akceptita. Paŭlo povis prediki la evangelion, kaj la Spirito de Dio povis labori.

Sed nun, Paŭlo demandas sin, kion li misfaris. Li demandas sin, ĉu tio kion li faris kaj diris utilis. Do, li pluiras, montrante ke ili iras sur la malĝusta vojo, sur senelira vojo.

Lia zorgo pri tiu ĉi eklezio, pri liaj infanetoj estas evidenta. Por li, ne temas pri volo ne resti sensukcesa. Li volas pro amo rekonduki siajn amikojn, siajn gefratojn en Kristo, sur la vojon de la graco, de la libereco, de la vero. Tion li deziras, ke Kristo formiĝu en ili, ke la Spirito estu en ilia koro kaj kriu al Dio: Abba, Patro.

Li atendas pri ili, ke ili estu fervoraj, sed fervoraj por la bono.

La fervoro de la "aliaj", de tiuj judismemaj kristanoj, havas kiel celon nur ekskludi ilin, ĉar kion ili petas estas tiel malfacile farebla, ke tiuj kredantoj mem ne povas plenumi. Fakte, ili atendas fervoron, kiu estu pli direktita al ili mem ol al Dio kaj la bono.

---------

Daŭrigo en la sekvonta numero.

## El *Preĝo por ĉiu tago* de Jelly Koopmans-Schotanus.



LA 8-AN DE MARTO

Amanta Sinjoro, gardu min kontraŭ ĉiu sklava timo. Ke mia vivo ne detruiĝu pro malkredo. Ĉirkaŭu min por ke la sortobatoj kaj zorgoj ne pereigu min.

# Pri la temploj de Niĵnij Tagil

Larisa KUZMENKO, RU

*Johano Zlatousto (Orbuŝulo) skribis: "Preĝejo estas ŝipo, kie homoj savas sin inter la ondoj de la monda maro"*

La kurta historio de la Skorbjaŝĉenskij Virina monaĥejo.

La vorto "Skorbjaŝĉenskij" devenas de la rusa vorto "Skorbj", kio signifas "malĝojo", "sufero". La monaĥeja templo estas dediĉita al la ikono de Dipatrino "ĝojo por ĉiuj suferantoj".

En 1855, kiam la urbo N.Tagil ankoraŭ ne havis fervojon, venis el la malproksima urbo Novgorod monaĥejestro de la vira monaĥejo, arĥimandrito Izraelo. Li trovis, ke en la uzina urbo Tagilo devas esti templo honore al la ikono de Dipatrino "ĝojo por ĉiuj suferantoj". La monaĥejestro sur la lokon de la estonta templo metis ŝtonan krucon. La ŝtonoj ne estis simplaj: ili estis veturigitaj el la Jerusalema tero. Nun ili kuŝas en la fundamento de la templo.

En la jaro 1864 la templo estis fondita dank'al la beno de la protopastro Aleksio Karpinskij kaj en la jaro 1883 ĝi estis sanktigita dank'al la beno de la gracoplena pastro Jefremo, la Perma kaj Verĥotura episkopo.

En Julio 1883 al la eparĥia estraro estis sendita la unua letero kun la peto pri malfermo de la monaĥejo ĉe la Skorbjaŝĉenskij templo.

En 1884 oni ricevis permeson fondi monaĥejon, kiu en la jaro 1895 fariĝis virina kaj la ukazo de la Sankta sinodo de 1904 konfirmis tion.

La unua monaĥino kaj priorino Marija venis en N. Tagilon el la urbo Permo. Ŝi estis nur 18-jara, sed aktiva virino. La monaĥejo havis grandan kaj belan ĝardenon, kie ili kreskigis kukumojn, tomatojn, berojn kaj fruktojn. Kiam Marija estis 75-jara, komunistoj komencis ruinigi templojn kaj persekuti kristanojn. Tri monaĥinoj estis ekzilitaj en Kazaĥion, unu en Siberion. En Kazaĥio forpasis la episkopo Leo, kiu diservis en la katedrala Ĉielira templo de la Skorbjaŝĉenskij monaĥejo. Lia patro, protopastro Vsevolod Ĉerepanov, kiu servis en la monaĥejo kaj instruis Dian Leĝon en la paroĥa lernejo ĉe la monaĥejo, estis pafmortigita.

En la jaro 1998, laŭ la ukazo de la Sankta Patriarĥo Aleksio II, estis enoficiigita monaĥejestrino Cirila (Suvorova) kaj oni komencis restaŭri la monaĥejon. La tiama Jekaterinburga kaj Verĥotura episkopo diris: "La restaŭrado de la malhonorigitaj sanktejoj, Diaj preĝejoj kaj monaĥejoj, estas grava afero. Sed pli grava afero estas restarigi kaj reordigi kripligitajn homajn

animojn. Por tio gravas lerni kiel esti humila antaŭ Dio, antaŭ monaĥejestrino kaj unu antaŭ alia, kio ne estas facila.”

---

**Preĝo por ke plenumiĝu la volo de Dio – de Respektinda Simeono la Nova Teologo.**

*Kompatema Patro, bonkora kaj milda, ĉar vi deziras savi ĉiun homon, kiu kredas al Vi, kompatu kaj aŭdu ĉi tiun mian peton. Ne estu kolera kaj ne evitu Vian vizaĝon de mi, sed instruu min plenumi Vian volon! Ne estu mia volo, sed Via, por kompati min kiel estas bone por Vi. Amen.*

---

Sen humileco ne estas saviĝo. Pri tio instruas la monaĥeja vivo.

La sepan jaron estas restaŭrata la virina monaĥejo. Ankoraŭ ne estas finita la riparo de la Ĉielira templo, ne estas aparta loĝejo por monaĥinoj (ili vivas sur la dua etaĝo de la templo sub sonorilejo), ankaŭ oni bezonas hotelon por pilgrimantoj.

La templo festas sian feston, dediĉitan al la ikono “ĝojo por ĉiuj suferantoj” la 6an de novembro. Dum la tago estas religia procesio (krucirado) ĉirkaŭ la templo kun religiaj standardoj, kandeloj kaj aspergado per sanktigita akvo.

## La templo de Sergij Radoneĵskij

Pri la nova templo en N. Tagil

Krom la malnovaj temploj, kiuj estas restaŭrataj, en N. Tagil oni konstruas novajn templojn. La plej bela templo estas dediĉita al la Respektinda Sanktulo Sergij Radoneĵskij, kiu vivis en la 14a jarcento kaj en la loko Radoneĵ apud Moskvo fondis monaĥejon: li estas glorata pro siaj mirakloj kaj fervora senlaca Dia laboro.

La templo estas konstruita en la plej grava distrikto de N.Tagilo, kie vivas multe da laboristoj, inĝenieroj kaj oficistoj, kiuj ankaŭ laboras en la granda Metalurgia uzino.

La templo havas sep origitajn kupolojn kaj meztage antaŭ kaj post diservoj oni povas aŭdi belan sonoriladon. La loko por la templo estis sanktigita en oktobro 2000 kaj la unua ŝtono estis metita de la Ruslanda Patriarĥo Aleksio la IIa.La distrikto havas pli ol 70 jarojn, sed neniam havis sian templon. La homoj, kiuj loĝas en la distrikto, longe atendis ĝian malfermon. Nun ili vizitas ĝin kun granda ĝojo. Ĝi estis malfermita en la jaro 2004, oktobre.

La bela templo similas al la templo, kiu iam estis en la alia distrikto de nia urbo kaj kiu estis ruinigita dum la Soveta periodo (sur tiu loko nun staras palaco “Jubilejnij”, konstruita en 1968



Vijsko-Nikola templo de N.Tagil. La templo estis en nia urbo. Estis ruinigita dum la soveta periodo.



La templo, dediĉita al Sergij Radoneĵskij de la urbo N.Tagil

kiam komunistoj festis 50 jarojn de revolucio).

La templo de Sergij Radoneĵskij havas belegan murpentraĵon. La moskvaj ikonopentristoj, kiuj pentris la murojn de la Moskva Templo de Krist-Savanto, pentris la murojn de la templo. Tie oni povas vidi la bildojn el la vivo de Sergij. Jen estas unu el la bildoj. Sur ĝi estas prezentita interparolo de la knabo-Sergij kun la Maljunulo. Laŭ la vivo de la sanktulo dum sia juneco Sergio ne bone sukcesis en lernado. Post ardaj preĝoj al Dio pri la helpo kompreni lernobjektojn Sergij renkontis la Maljunulon. Kiu li estis? Ĉu iu Sanktulo aŭ Anĝelo? Ĝuste oni ne scias. Nur de tiam li komencis lerni bone kaj facile.

Sur la alia bildo Sergij estas monaĥo kaj konstruas preĝejon, estas ĉarpentisto en la arbaro. Ankaŭ estas alia unika bildo en la templo. La ĉefurbaj ikonopentristoj decidis pentri ĝin petinte benon ĉe la arĥiepiskopo Jekaterinburga kaj Verĥotura Vikentij. Sur la bildo super la ĉerkujo, kovrita per mortotuko, kiu simbolas la ikonon de la mortinta Kristo, oni povas ekvidi la grupan komponaĵon "Kunveno de la lernantoj de la Deculo Sergij Radoneĵskij". La homoj, kiuj estas pentritaj sur ĝi, dediĉis sin al Dia servo dum la vivo de Sergij kaj post lia morto. Ĉiuj, kiuj sekvis lin en la monaĥejo de Sankt-Trinitata-Sergia Laŭro, kaj kiuj estas sanktuloj estas ĉi tie. La pentristoj mense kunigis ilin kaj kreis eksterordinaran tolaĵon.

Oni povas longe stari antaŭ ĉiu ikono kaj tute ne rimarki tempon sed nur admiradi la arton de la kreaĵoj. Tie estas malnovaj kaj novaj ikonoj, kiuj ankaŭ estas valoraj. Sur ili oni povas vidi nian uralan tre bonan sanktulon Simeon Verĥoturskij kaj la lastan Patriarĥon Tiĥon de antaŭrevolucia Rusio.

Ĉiu, kiu eniras la templon, nepre klinas sin antaŭ la ikono de la Respektinda Sanktulo Sergij Radoneĵskij kun la ero de lia relikvo, veturigita kiel donaco de Feognosto, la prioro de Sergia Laŭro kaj arĥiepiskopo Teofilakto el la urbo Brjansk.

La ikonostazo de la templo estas mirinda kaj unika. Ekzistas nur dek ikonostazoj, similaj al ĝi en Ruslando. Dum la suna vetero ĝi brilas per dek mil ŝtonoj inter kiuj troviĝas ikonoj.

La oraj koloroj estis precipe uzitaj en 1500 kvadrataj metroj de la pentraĵoj. Ĉiu kristano, estante en la templo, sentas eksterordinaran ĝojon. La ĝenerala intenco unuigis sub la kupoloj de la templo harmonion de vorto, sono, koloro kaj senso.

La templo de Sergio Radoneĵskij es-

tas la naŭa templo en N. Tagil, kiu malfermis pordon al la kristanoj dum la jaroj de rusa renaskiĝo. Hodiaŭ multaj urbanoj volas baptigi siajn infanojn en la templo. La festo, dediĉita al la templo, estas celebrata la 8an de oktobro kiam oni festas la tagon de Sergij Radoneĵskij. Li forpasis dum la tago kaj liaj lastaj vortoj estis: “Timu Dion, havu purecon kaj amon nehipokritan en animo.” ☙

# Oni apenaŭ povas kredi...

Amnesty International

Dum la lasta tempo, ĉar Fondaĵo Evidente havas gravan porblindulan projekton en tiu lando, mi denove tre okupiĝas pri Kosovo, jam preskaŭ malaperinta el la novaĵrubrikoj de televido kaj gazetaro.

Oni apenaŭ povas iom kompreni: la militistoj, kies precipa tasko estas protekti la Kosovan loĝantaron, kaŭzas - kontraŭe - abundon da mizero kaj sufero. Kosovo, nome, fariĝis centro de eŭropa negocado pri virinoj. Kaj kelke da eksterlandaj soldatoj en tio ludas ekstreme duban rolon!

Pensante pri Kosovo ni plejofte havas antaŭ la mensaj okuloj la dramajn okazintaĵojn fine de la naŭdekaj jaroj, kiam perforte atakintervenis NATO-anoj. Sed multaj homoj ne scias, ke ankaŭ hodiaŭ okazas nepriskribeblaj teruraĵoj. Kaj nemalmultaj tie ankoraŭ 'servantaj' militistoj plene kunrespon-sas.

Pli ol naŭ el dek negocitaj virinoj en Kosovo deĵoras en la tiel nomata seksindustrio. Ankaŭ internaci-armeaj soldatoj uzadas iliajn servojn, dum ilia unua devo estas ĉiel protekti tiujn virinojn. Sekve de ilia speciala pozicio oni nur malofte punas ilin pro ilia helpado al tiuterenaj fiuloj.

Ke miloj da virinoj viktimiĝis kaŭze de ĉi tiu terura misuzado de potenco estas vera dramo. Kaj ke ĝuste pac-armeaj militistoj ĉe tio koncerniĝas, estas superlativa skandalo! Tial AMNESTIO INTERNACIA alvokas la aŭtoritatulojn en Kosovo fari antaŭzorgajn aranĝojn por preventi negocadon pri virinoj kaj devigan prostituadon de junaj knabinoj kaj plenkreskaj virinoj.

La agado de Amnestio jam kondukis al ekrezultoj, sed pli da iniciatoj kaj protestoj necesas. Se ni havas la eblecon ĉi-kampe plifortigi la laboron de Amnestio, hezitu eĉ ne unu minuton!

Jacques TUINDER

# MI ESTAS KIU ESTAS – PARTO 7

## MI ESTAS LA VOJO KAJ LA VERO KAJ LA VIVO (Joh 14:1–7)

pastoro Bayo AFOLARANMI

> Ne maltrankviliĝu via koro; vi kredas al Dio, kredu ankaŭ al mi. Ĉe la domo de mia Patro estas multe da loĝejoj; se ne tiel estus, mi dirus al vi; mi iras, por pretigi por vi lokon. Kaj se mi iros kaj pretigos por vi lokon, mi revenos kaj ricevos vin al mi mem, por ke vi ankau estu tie, kie mi estas.
> Joh 14:1-3

### Enkonduko

La sepa parto de nia studo de la granda "MI ESTAS–diraĵoj" de nia Sinjoro Jesuo Kristo estas tre fundamenta kaj esenca al nia Kristana kredo ĉar ĝi prezentas Jesuon Kriston kiel la unu-nuran vojon al ĉielo. Ĝi estas unu el la du "MI ESTAS–diraĵoj" alparolitaj al la disĉiploj ekskluzive dum la lasta vespermanĝo de Jesuo Kristo en la supra ĉambro. Ĉi tiu unua diraĵo temas pri kvar grandaj lecionoj:

### La granda konsilo

(versiklo 1)

Kelkaj eventoj kiujn Jesuo Kristo antaŭdiris malkuraĝigis la disĉiplojn:

1. Li foriros (Joh 7:34; 8:21; 12:8, 35; 13:33);
2. Li mortos (Joh 12:32–33);
3. Unu el ili estas perfidanto (Joh 13:21)
4. Satano agis kontraŭ ĉiuj el ili (Luk 22:31–32)
5. Petro malkonfesos Lin trifoje (Joh 13:38); kaj vi.
6. Ili ĉiuj ofendiĝos pro Li (Mat 26:31).

Tamen, Jesuo Kristo konsilis al ili fidi al Li. Li konsilis al ili esti viroj de kuraĝo kaj fidi al Dio, ne al homo (vidu: Jer 17:5–8). Fido estas la granda kontraŭveneno por afliktita koro.

### La granda promeso

(versikloj 2–3)

Jesuo Kristo atestis pri la realeco de ĉielo kie Li estis ironta prepari lokon por la disĉiploj (kiel same por aliaj kredantoj), kaj reveni por preni ilin. Ĉi tiu granda promeso estas la Ekstazo de la sanktuloj (1 Tes 4:13–18). La re-kompenco de kristana servo en la est-onto estas kuraĝigo por la disĉiploj kaj eĉ por kredantoj nuntempe persisti en afliktoj de kredo.

> Kaj kien mi iras , vi scias, kaj vi konas la vojon. Tomaso diras al li: Sinjoro, ni ne scias, kien vi iras; kiel ni konas la vojon?
> Joh 14:4-5

## La granda demando

(versikloj 4–5)

Jesuo Kristo supozis ke Liaj disĉiploj sciis la vojon. Tiutempe, ili ne konis Jesuon Kriston kiel la ununuran vojon al ĉielo malgraŭ Liaj instruoj pri Si mem preskaŭ tri jarojn. Tamen, estis viro inter la disĉiploj nomita Tomaso, kiu estas ofte konata kiel dubinto, sed li estis viro de sindoneco, viro de kuraĝiĝo, kaj sincera viro. Lia sincereco okazigis la grandan demandon en versiklo 5. la aliaj disĉiploj ne sciis la respondon (vidu: Joh 13:36); ili nur sekvis Jesuon Kriston. Ili povis scii ĉi tion post la morto kaj releviĝo de Jesuo Kristo. Ne trompu vin; ĉu vi reale scias ĉi tiun fakton?

> Jesuo diris al li: Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo; neniu venas al la Patro krom per mi. Se vi min konus, vi konus ankaŭ mian Patron; kaj de nun vi konas Lin kaj Lin vidis.
>
> Joh 14:6-7

## La granda revelacio

(versikloj 6–7)

La sincereco de Tomaso donis al ni grandan revelacion (versikloj 5–6) (komparu Joh 20:29 kie lia dubo fariĝis beno por ni). La granda revelacio estas la respondo de Jesuo al la demando de Tomaso: *Mi estas la vojo kaj la vero kaj la vivo*. Jesuo Kristo estas la vojo al Dio (versiklo 6b, vidu: 10:9). Li ne estas unu el multaj vojoj, sed UNUNURA Vojo (vidu: Agoj 4:12; Heb 10:19–20). Ĉi tio faras el kristanismo ekskluzivan religion. Ĝi fariĝas unika. Jesuo Kristo estas la Vojo ĉar Li estas la Vero kaj Vivo. Alia ebla traduko de ĉi tiu diraĵo estas: *Mi estas la vera viva vojo*. Ĉiuj aliaj vojoj estas falsaj kaj kondukos al eterna morto en infero. Jesuo Kristo kiel la Vero (tio kio estas vera, reala, kaj aktuala) faras la vojon fidinda kaj neerarema (vidu: Joh 1:14; 8:32,36; Efe 4:20–21). Li estas vivo ĉar Li grace donas eternan vivon — senlime altan kvaliton de vivo en viva kuneco kun Dio, kaj nune kaj eterne — al ĉiu kiu kredas je Li (vidu: Joh 1:4; 3:15,16; 10:10, 28). Alia revelacio estis aldonita en versiklo 7: Iu ajn kiu konas Lin same konos Dion. Alivorte, iu ajn kiu ne akceptas Lin ne konas Dion. Neniu povas pretendi ke li konas aŭ adoras Dion sen unue koni Jesuon Kriston. Ĉi tiu "kono" transcendas faktan konon pri Jesuo Kristo. Ĝi estas la daŭra sperta kono de Li (vidu: Fil 3:10). Ĉu vi konas Lin?

## Konkludo

Kio afliktas vian koron? Ne fidu al la ĉiam–ŝanĝanta cirkonstanco aŭ sento, sed fidu al la eterna promeso de Dio. Fidu al Dio kaj al Jesuo Kristo. Li jam preparadas lokon por ni en la ĉielo. Ĉu vi iros kun Li dum Li venos preni Siajn proprulojn? Ĉu vi trompas vin estante religia sen koni Jesuon Kriston — la ununuran veran vivan Vojon? Vi ne povas eniri la ĉielon sen Li. Akceptu Lin hodiaŭ kiel vian Vojon al ĉielo! ∞

# Konfeso

MU Binghua, Ĉinio

Post kiam instruisto Ŭang emeritiĝis, li kun memfido opiniis, ke li akceptis en sia juneco multajn jurojn da eduko, pere de tio li kapablas verki kontribuaĵojn, sekve ricevos aŭtorajn honorariojn, kaj per ili monhelpos la familion. Ŝajnas al li, ke tio estos tre certa. Kontribuaĵoj estis senditaj de li unu post alia al gazetoj, kaj li tute ne atendis, ke informo pri enpreso neniam venus al li. Nu, oni ne aperigis en gazeto aŭ ĵurnalo lian artikolon, kaj tia afero iom lin hontigis. Li do ĵuris estonte ne plu verki.

Hazarde li vidis maljunan Ĝang kaj maljunan Li ofte fiŝhoki ĉe la lago. La fiŝhokado evidente estas por maljunuloj agrabla ŝatokupo. Tial ankaŭ instruisto Ŭang mem aĉetis kompleton de fiŝkaptiloj kaj estis intencanta, sekvante maljunulojn Ĝang kaj Li, iri fiŝhoki por distri sin en la bela naturo.

Estis tago serena kaj varmeta, en kiu Ŭang fiŝhokis triope kun la du maljunuloj. De mateno ĝis vespero, kiam la suno jam malleviĝis de sur malproksima monto. Maljuna Ĝang hokis sep aŭ ok karpojn grasajn, grandajn kaj malgrandajn, kaj ankaŭ maljunulo Li kelkfoje ĝojkriis: ”Fiŝo estas hokita! Hodiaŭ vespere mi havos frandaĵon... ”

Aŭ instruisto Ŭang ne estis sperta en hokado aŭ fiŝoj ne emis enbuŝigi lian logaĵon; unuvorte, lia fiŝkorbo efektive estis malplena. La suno daŭre mallevis sin okcidenten, instruisto Ŭang, kompatinda, finfine reprenis la fiŝkanon kaj vole nevole devis reveni hejmen.

Instruisto Ŭang estas homo tiaspeca, kiu tre domaĝas sian reputacion. Reirante hejmen, survoje li pensis en si, ke hodiaŭ mi faris unuafojan fiŝhokadon kaj reiros hejmen kun nenio en ambaŭ manoj; ĉu la familianoj, precipe miaj gefiloj, ne mokos min? Ĉe tio li etendis sian manon kaj palpis sian poŝon. Ha, en ĝi estas dek juanoj enmetitaj de lia edzino. Kiam ĉi-matene li deiris de la hejmo por fiŝhoki, lia edzino enmetis la monon en lian poŝon, por ke li per ĝi aĉetu tagmanĝon. Sed, li tiel absorbiĝis en sia hokado, ke li eĉ tute forgesis tion fari. Li deviis de la vojo, eniris bazaron kaj tie aĉetis de fiŝvendisto unu karpon pli ol unu kilogramo pezan.

Lia edzino vidis lin, portanta tiel



grandan karpon, reveni en la hejmon. Ŝi iom dubis je tio. Instruisto Ŭang serioze diris: ”Kion vi rigardas? Ĉu vi ne kredas je mia tekniko pri fiŝhoko?” La edzino tre ĝojis, tiel ke ŝi tuj aĉetis skatolon da cigaredoj kaj botelon da vino por lin regali.

Instruisto Ŭang, kiu antaŭe neniam mensogis, nun, kun manĝotuko antaŭ la brusto, sidis ĉe la manĝotablo aŭskultante la laŭdojn faritajn de familianoj. Ju pli li aŭdis, des pli li sentis sin ĝenata. Fine, li kuraĝigis sin kaj faris decidon: mi konfesu al ili la fakton! Ne gravis lia konfeso, sed tio ja kaŭzis pli grandan jubiladon en la tuta hejma rondo. Ĉiuj familianoj estis pli gajaj, ol gustumi fiŝon hokitan de li. ᘛ

---

# Garantiata sato

*Ho vi, ĉiuj soifantoj, iru al la akvo, kaj vi, kiuj ne havas monon; iru, aĉetu, kaj manĝu; iru, aĉetu sen mono kaj sen pago vinon kaj lakton. Kial vi donas monon por tio, kio ne estas pano? kaj vian laboron por tio, kio ne satigas? aŭskultu do Min, kaj manĝu bonaĵon, kaj via animo ĝuu grasaĵon. (Jesaja 55:1–2)*

Ni homoj serĉas satiĝon ĉiumaniere. Kelkaj el ni serĉis satiĝon en la plej strangaj manieroj. Alkoholo, drogoj, iu ekzotika religio, vetado, muziko, televido, libroj... sed ne trovas kontentiĝon. Ni ĉiam soifas kaj malsatas en nia animo.

Kontraste al tio estas la aferoj kiujn Dio ofertas al ni. Abundaj kaj riĉaj manĝaĵo kaj akvo. Kaj tiuj estas ne nur senpagaj kaj abundaj, sed plej grave, ili satigas nin, la rezulto de tio estas ĝojo kaj sato.

Jesuo diris al la Samarianino: sed kiu trinkos el la akvo, kiun mi donos al li, tiu neniam soifos; sed la akvo, kiun mi donos al li, fariĝos en li fonto de akvo, ŝprucanta supren por eterna vivo (Johano 4:14).

Israel devis lerni tiun ĉi veron en la plej malfacila maniero. Malgraŭ la pledoj de Jesaja, la popolo decidis persekuti la materiaĵojn kaj politikaĵojn anstataŭ sin turni al Dio. Je la fino, ili perdis ĉion, kaj ili estis forprenataj al Babilonio.

Ĉu vi serĉas satiĝon? Malfermu vian Biblion, do, kaj partoprenu la festenon kiun Dio preparis por vi. Lia promeso estas, ke vi pentos pri neniu momento kiun vi pasigis ĉe Lia tablo.

Dio Benu vin!
Elmer ESCOTO

LA PROFILO

# SPERTA ESTRARANO

Britta REHM, SE

**Sufiĉe multaj personoj konas min** ĉar mi estis videbla en multaj KELI- kaj ekumenaj kongresoj depost mia plej unua en Boldern, Svislando 1965.

**Mi naskiĝis 1930 en vilaĝo** 50 km ekster Gotenburgo. Mia patrino bedaŭrinde mortis tri semajnojn poste. Ŝia frato kun edzino adoptis min. Ili loĝis en Gotenburgo kaj de tiam mi ĉiam loĝis tie ĉi.

**Mi ricevis bonan hejmon** ĉe ili. Mi estis eta, malforta bebo ĉar mi havis ĝemelan fratinon kiu ankaŭ mortis. Helpe de mia nova patrino mi ĉerpis novajn fortojn kaj poste mi povis studi dek jarojn 1937-1947. Mi fariĝis kristano 1948 (baptisto) kaj estas membro de eta preĝeja komunumo.

**Mia profesio** estas kuracist-sekretariino en la radiografa fako kaj laboris en granda universitata malsanulejo 30 jarojn kaj poste 15 jarojn en pli malgranda malsanulejo okaze de tro multe da laboro en la granda. Mi skribis radiografiajn ekspertizojn, prizorgis la grandan arkivon kaj multe pli.

**Mi edziniĝis al mia kara Erik** 1958 kaj ni vivis kune ĝis lia morto 1994. Mi komencis studi Esperanton jam 1945. Tiam nia instruisto demandis nin "Ĉu vi volus lerni esperanton post la ordinaraj studhoroj se mi instruos vin?". Inter aliaj mi volis kaj mi neniam pentis tion ĉar esperanto riĉigis mian vivon multe.

**En la "movado"** mi estis sekretariino de la loka KELI-klubo kaj same por la sveda KELI-sekcio multajn jarojn. Membro en la KELI-estraro de post 1986 sed ne tro multe faris!

**Nuntempe mi aktivas** en la Gotenburga Esperantoklubo kiel kasisto kaj skribas la protokolojn. Mia vic-kasisto faras la komputeran laboron. Krome mi estis en la LKK por la Universala Kongreso ĉi tie 2003 kaj respondecis i.a. pri la ekskursoj kaj rezervis la ejon por la kongresa Diservo, nia katedralo.

**Feliĉe mi dum la vivo** havis eblecon vojaĝi multe, kion mi ĉiam ŝatis. Krom enlande, mi eksterlande vizitis multajn esperanto-kongresojn kaj faris privatajn vizitojn al esperantistoj. Profesie mi eĉ plurfoje vojaĝis ekster Eŭropo al mondkongresoj. Mia edzo havis subtilan humuron. Foje li diris: "Se vi preterpasus Gotenburgon, bonvolu viziti min!".

**Favoran lokon mi havas** – Budapest. Mi konatiĝis en Kiljava 1969 kun Irén BAGI kaj ni tenis la kontakton ekde tiam. La lastajn dek jarojn ŝi afable akceptis min konekse kun la hungaraj kongresoj kaj aliokaze.



Jen mi! Ĝojigas min pensi pri miaj karaj kristanaj esperantogeamikoj.

Pri la libro

# La frakseno Igdrasilo

Recenzo de Leif NORDENSTORM




Alf Henrikson (teksto) & Edward Lindahl (bildo): La frakseno Igdrasilo. Antikva dia historio. Eldona Societo Esperanto. Stockholm, 2005. www.algonet.se/~eldona

La aŭtoro Alf Henrikson estas al svedaj legantoj bone konata verkisto kaj historiisto. Ankaŭ *La frakseno Igdrasilo* estas sufiĉe bone konata al svedoj. Idgrasilo estas la mondarbo de la antikvaj mitoj de la nordiaj popoloj. Do por ni svedoj estas nepre ĝojiga afero ke la libro nun aperis en Esperanto. La eldono estas belega kun bildoj de la desegnisto Edward Lindahl sur ĉiu paĝo.

La tradukon faris Bertil Nilsson. Terminoj pri praskandinavaj aferoj jam estas delonge uzataj en Esperanto. Eĉ en PIV aperas vortoj kiel Valhalo, Toro, Odino, Freja, azoj k.t.p. La tradukinto inventis nur naŭ proprajn vortojn, pri kies neceso aŭ neneceso oni kompreneble povas diskuti. Ni tamen ne diskutos tion en tie ĉi. Koncize dirite: la traduko estas bona kaj en normala Esperanto.

Ni tamen diskutu alian aferon, kiu estas grava por ni kristanoj. Kia libro estas *La frakseno Igdrasilo?* Kompreneble ĝi ne estas ”La biblio” de la praskandinava religio. Tiu religio ja ne estis skriba religio kaj nur malmultaj el ĝiaj anoj vere scipovis skribi kaj legi runojn. Mitojn kaj rakontojn unu generacio transdonis al la sekvanta. Parto de la mitaro havas similecojn kun aliaj hindeŭropaj mitoj. La nomo ”Tiro” ekzemple etimologie estas la sama nomo kiel la helena Zeŭso kaj la latina Jovo/Jupitero. Jam dum la pagana epoko cetere enmiksiĝis kaj sameaj kaj kristanaj eroj en la praskandinavan mitaron. La praskandinavaj mitoj surpaperiĝis en Islando nur kiam la religio mem mortis. La islandano – mem kristano – Snorri Sturluson kolektis la mitojn kaj metis ilin en kadran rakonton, nur kiam la praskandinava religio jam mortis kaj ĝiaj mitoj ne plu povus minaci la kristanismon en Islando. La celo estis kultura. Li volis helpi al islandanoj kompreni antikvajn poezion kaj rakontojn.

En *La frakseno Igdrasilo* Alf Henriksson denove rerakontas kelkajn mitojn en nova kadra rakonto. Tiu kadro grandparte estas la invento de la verkisto mem, precipe kiam temas pri la fino de la libro. Ĉe Henriksson Ragnaroko jam okazis. Niaj ferepokaj pragepatroj atendis ke ĝi okazos estonte.

Do, se oni nur memoras ke *La frakseno Igdrasilo* ne estis ”La biblio de la vikingoj” ĝi estas bone legebla kaj ĝuebla fabelaro por plenkreskuloj kaj por infanoj. ☙

Pri la libro

# *Pano por animo*

Verkita de MA Young-tae

## Antaŭparolo

Antaŭ ĉ. 20 jaroj mi iris al Usono kaj studis tie dum unu jaro, kaj unu el la plej impresaj aferoj, kiujn mi ricevis dum mia restado en tiu lando, estis, ke usonanoj havas tiel grandan intereson pri la spirita mondo

Ekzemple, en la urbo Bostono estas la fama universitato Harvard. Se vi eniras en la pordon de la Universitato, vi trovos bibliotekon dekstre kaj kontraŭ ĝi la preĝejon, kiu estis konstruita por memori la soldatojn, kiuj estis la studentoj de la Universitato kaj mortis en milita batalejo.

Kaj estis interese, ke la altoj de la pinakloj de la du konstruaĵoj estis samaj.

La kialo estas, ke la homa intelekto kaj spirita nivelo devas teni ekvilibron, ĉar la alto de la biblioteko simbolas la nivelon de homa intelekto kaj la alto de la preĝejo tiun de la spirita nivelo de homo.

Vidante tion, mi eksciis la fakton, ke Usono fariĝis la plej forta lando en la mondo ne hazarde sed surbaze de la solida fido al Dio.

Tiu ĉi 'Pano por animo', estas la libro, kiu provizos la spiritajn nutraĵojn al la modernaj homoj, kiuj vagadas nesolvante la spiritan soifon, kvankam ili ĝuas kaj prikantas la materian riĉecon.

La rakontoj prezentitaj en tiu ĉi eta libro estas tradukaĵoj el la predikoj de famaj pastoroj en- kaj eksterlandaj.

Mi esperas, ke tiu ĉi libro kontribuos por plivastigi la terenon de esperanta kulturo kaj helpos al la legantoj altigi ankaŭ la spiritan nivelon.

junio, 2005
MA Young-tae en Koreio



# Informetoj

## Interreta dissendolisto formiĝis

Kelkaj listanoj, mi kredas, memoras pri la ekzisto de nia ortodoksa grupeto. Se tiel, mi tre ĝojus. Bonaj amikoj de Esperanto konsilis al ni fondi propran dissendoliston. Tion ja ni faris! Ni petas informi viajn konatajn ortodoksulojn pri la fondo de la listo kaj bonvenigi ilin. Krome, ni certe ĝojus vidi en la listo ankaŭ alikonfesiajn kristanojn, se ili konsideras sin niaj amikoj.

Jen la adreso de la abono:
*kristana-ortodoksa-rondo-esperantista-subscribe@yahoogroups.com*
Bonvenon!
Bondezire, Ilija Smikov

---

## Karaj

Lastatempe naskiĝis Korea Esperanto-Misio kaj ĝia hejmpaĝo, en kiu mi prezentas diversajn aferojn pri kristanismo:

1. La tutan Sanktan Biblion kun markoj de ĉapitroj kaj versikloj - esperante,
2. Adorkantojn de soprano kaj tenoro kaj baritonoj - koree kaj angle,
3. Pano por Animo - esperante kaj koree,
4. Kio estas kristanismo - esperante kaj koree,
5. Predikojn de pastoro CHO Yong-Ki - koree kaj angle
6. Esperanto, kiuj lernas pere de la Sankta Biblio - esperante kaj koree

Mi preĝas, ke la abunda beno de Jesuo Kristo pluvu sur ĉiujn, kiuj vizitas al mia hejmpaĝo (http://jesuo.net).

MA Young-tae, Korea Esperanto-Misio

# Daŭriga listo de partoprenontoj de la 2006-jara KELI-kongreso en Ĉeĥio

| | | | |
|---|---|---|---|
| 26 | S-ro | TICHÝ Pavel | Ĉeĥio |
| 27 | S-ro | SANDOZ Andreo | Svislando |
| 28 | S-ro | POSPÍŜIL Václav | Ĉeĥio |
| 29 | S-ino | RÓZA Zsuzsa | Hungario |
| 30 | J-lo | BAGI László | Hungario |
| 31 | J-lo | BAGI György | Hungario |
| 32 | J-ino | JUHÁSZ Anna | Hungario |
| 33 | S-ino | van DIJK Ingeborg | Nederlando |
| 34 | S-ro | GAILLARD Samuel | Francio |

Pri la kongreso vi informiĝu ĉe:
Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, 290 01 Poděbrady, Ĉeĥio
Telefono kun faksilo: +420 325 615 651
E-mail: cea.polnicky@quick.cz

## La proponita temo de la kongreso estas:

*Naturo kaj progreso: kion toleri*

El la 19a psalmo ni tondas:
1 La ĉieloj rakontas la gloron de Dio,
Kaj la farojn de Liaj manoj raportas la ĉiela firmaĵo.
2 Tago al tago transdonas diron,
Kaj nokto al nokto faras sciigon.
3 Sen parolo kaj sen vortoj;
Oni ne aŭdas ilian voĉon.
4 Tra la tuta mondo iras ilia ordono,
Kaj ĝis la fino de la universo iras iliaj vortoj;
Por la suno Li aranĝis tendon inter ili.
5 Kaj ĝi eliras kiel fianĉo el sia baldakeno,
Ĝojas kiel heroo, trakuranta sian vojon.
6 Sur unu rando de la ĉielo estas ĝia leviĝo,
Kaj ĝia rondiro estas ĝis aliaj randoj;
Kaj nenio kaŝiĝas antaŭ ĝia varmego.



# La preĝo de Manase

Tradukis el la greka Gerrit BERVELING, NL

1 Sinjoro ĉiopova, Dio de niaj patroj, de Abraham, Izaak kaj Jakob, kaj de ilia justa idaro,
2 Vi kiu faris ĉielon kaj teron kun tuta ĝia ornamo,
3 kiu ligis la maron per la parolo de Via ordono, Vi kiu ŝlosis la Profundegon kaj sigelis ĝin per Via timinda glora nomo;
4 Vi, antaŭ kiu timas kaj tremas ĉio, pro Via potenca vizaĝo,
5 ĉar ne eblas elteni la majeston de Via gloro nek eblas toleri Vian minacan koleron kontraŭ la pekuloj;
6 sed tamen: senlima kaj ne traspurebla estas la kompatemo de Viaj promesoj,
7 ĉar Vi estas la Sinjoro, la plej alta: pardonema, kompatema kaj gracoplena, kaj Vi pentas pri homa sufero.
8 Vi do, Sinjoro, Dio de la justuloj, Vi ne devigis pentemon por la justuloj, Por Abraham, Izaak kaj Jakob, kiuj ne pekis antaŭ Vi, Sed min "pekulon" Vi devigis al pentemo.
9 Ĉar miaj pekoj estas pli nombraj ol la mara sablo: abundas miaj malbonagoj, Sinjoro: ili abundas! Mi ne meritas levi la rigardon kaj spekti la altan ĉielon, pro la amaso de miaj maljustaĵoj.
10 Kurbigite sub multaj feraj katenoj, tiel ke mian kapon mi ne povas levi pro miaj pekoj, mi ne havas malstreĉiĝon, ĉar Vian koleron mi vekis kaj malbonon mi faris antaŭ Vi, starigante abomenindaĵojn kaj multigante indignaĵojn.
11 Kaj nun mi kurbigas la genuojn de mia koro, petegante pri Via boneco.
12 Mi pekis, Sinjoro: mi pekis, kaj mi rekonas miajn malbonagojn.
13 Petege mi imploras Vin: Pardonu min, Sinjoro: pardonu min! Ne neniigu min kun miaj malbonagoj! Ne gvatu miajn fiagojn kun eterna rankoro, nek pune kondamnu min en la plejprofundon de la tero, ĉar Vi, Sinjoro, estas la Dio de la pentemuloj.
14 Sed montru en mi Vian bonecon, kaj savu min "senmerite" laŭ Via granda kompatemo.
15 Tiam mi laŭdos Vin ĉiujn tagojn de mia vivo, ĉar la tuta forto de la ĉieloj himnas pri Vi kaj Via estas la gloro, eterne.

Amen.